# La 49-a Konferenco de ILEI

## Nyíregyháza, 30/07 - 06/08/2016

## Novaj vojoj de lernado

Novaj vojoj de lernado en la moderna pedagogio signifas ne nur novajn lernteknologiojn kaj instrurimedojn, sed unuavice novan aliron al la lernado kaj instruado kun ŝanĝitaj roloj de la lernanto kaj la instruanto en la lernprocezo. Estas tasko de ILEI sekvi tiun evoluon por progresigi la pedagogion de Esperanto konforme al la Statuto kaj rolo de ILEI en la Strategia laborplano de UEA. La Universitato de Nyíregyháza (Nyíregyházi Egyetemen), kie ILEI konferencos en la jaro 2016, estas bona loko por tiutemaj diskutoj de esperantistaj pedagogoj. Pliaj prikonferencaj informoj legeblas ĉi-sube. Aliĝilon por la konferenco vi trovos ĉi tie kaj la liston de aliĝintoj tie ĉi.

## Kotiztabelo de ILEI-konferenco en Nyíregyháza, 2016

| **Aliĝperiodo*:** | **ĝis 30.04.2016** | | **ĝis 30.06.2016** | | **post 30.06.2016** | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **Aliĝkategorio**:** | A | B | A | B | A | B |
| Membro de ILEI[(1)] | 60 € | 35 € | 70 € | 40 € | 85 € | 50 € |
| Ne-membro | 75 € | 50 € | 90 € | 55 € | 105 € | 65 € |
| Infano ĝis 18 j. [(2)] | 5 € | 5 € | 5 € | 5 € | 5 € | 5 € |
| Junulo[(3)], handik.[(4)] | 30 € | 20 € | 35 € | 25 € | 40 € | 30 € |
| Familiano[(5)] | 50% | 50% | 50% | 50% | 50% | 50% |
| Nur-simpozia[(6)] | 30 € | 30 € | 35 € | 35 € | 40 € | 40 € |

* Por frualiĝantoj, kiuj pagos la kotizon plej laste ĝis 2015-12-31, validas speciale rabatitaj kotizoj por por tutsemajnaj partoprenantoj:

| | Membro[(1)] | Ne-membro | Junulo[(3)], handikapulo[(4)] |
|---|---|---|---|
| A** | 50 € | 65 € | 25€ |
| B** | 30 € | 40 € | 15 € |

**Kotizkategorioj:

A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.
B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

(1) Membro estas tiu, kiu jam pagis kotizon al ILEI por la jaro 2016. Honoraj membroj ĝuas 100%-an rabaton.

(2) Infanoj kun akompananto kaj junuloj aĝaj ĝis 18 j. je 31 Dec. 2015 pagas la infanan konferencan kotizon.

(3) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1986.

(4) Handikapulo. Bonvolu sendi al ILEI atestilon.

(5) Familiano: Se aliĝas du aŭ pliaj samfamilianoj, unu el ili pagu plenan kotizon kaj la cetera(j) (escepte de infanoj, junuloj, handikapuloj kaj aliaj kiuj jam ĝuas alikaŭzan kotizrabaton) pagu 50% de la respektiva kotizo el la kotiztabelo.

(6) Partatempa kotizo: Por nur-simpozia, aŭ ajna partopreno dum nur unu aŭ du tagoj, validas aparta, malpli alta kotizo. Por partopreno longa pli ol 2 tagoj validas la plena kotizo laŭ la kotiztabelo.

## Partoprenkondiĉoj laŭ la Konferenca Regularo (punktoj 6-9)

6. Konferencanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Konferencan Regularon aŭ malutilas al la ILEI-Konferenco kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas ILEI-Konferenco. [...]

7. Ĉiu vendado de varoj en ILEI-Konferenco bezonas antaŭan aprobon de la Estraro, kiu starigas la kondiĉojn. Skriba peto pri tia agado estu liverita al la Estrarano pri Konferencoj nepre antaŭ la 30-a de Junio de la konferenca jaro.

8. La Estrarano pri Konferencoj rajtas haltigi ĉiun agadon koncerne ILEI-Konferencon, kiu ne konformas al ĉi tiu Regularo. [...]

9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. [...]

## Loĝado

Loĝadon apud aŭ proksime de la konferencejo eblas mendi per reta mendilo ĉi tie.

## Konferenca temo: *Novaj vojoj de lernado*

Inter la 17 celoj difinitaj de UN por la daŭropova evoluo dum la periodo 2015-2030 (*Esperanto*, Novembro 2015, p. 230) gravan lokon okupas edukado. Precipe grava por ILEI kiel asocio de edukantoj estas la 4-a celo:

> *Garantii inkluzivan kaj egalecan, bonkvalitan edukadon kaj plivastigi por ĉiuj la ŝancon por tutviva lernado.*

Tio estas kion ILEI laŭdifine rekte atentas, aŭ devus atenti, en siaj agadplanoj kaj aktivaĵoj. Ankaŭ la celoj 5 (egaleco inter la seksoj, virinaj rajtoj), 10 (redukti malegalecon ene de landoj kaj inter landoj), 16 (konstruado de pacaj kaj inkluzivaj socioj por daŭropova evoluo) kaj 17 (realigaj kapabloj, tutmonda partnereco) estas proksimaj al la laŭstatutaj celoj kaj programorientiĝo de ILEI. La ceteraj 12 celoj de UN, kiuj rilatas al forigo de malriĉo kaj malsato, garantio de sano, akvo, energio, ekonomia kresko, infrastrukturo, batalo kontraŭ klimatŝanĝiĝo, prizorgo de oceanoj kaj maroj, protekto de ekosistemoj k.c., ne apartenas al la agadtereno de ILEI. Tamen, la E-komunumo per sia informa agado povas helpi vastan konsciigon pri ilia graveco kaj popularigadon de planoj kaj atingoj de ilia realigado.

## E-lernantoj en la centro de atento

Ni revenu al la *bonkvalita edukado* kaj *tutviva lernado* el la 4-a celo. Tio signifas adekvatajn kondiĉojn kaj rimedojn por lernado, egalece kaj juste alireblajn al ĉiuj bezonantoj. La teknologio, precipe IKT (inform-komunika teknologio), ekipis la modernan pedagogion per potencaj rimedoj por kreado, disponigo kaj uzado de lernmaterialoj. La E-kursoj kaj lernfaciligaj materialoj ĉe, ekzemple, lernu.net, edukado.net kaj duolingo.com montras kiel la pedagogio de E-o akceptas kaj utiligas lernteknologiajn novaĵojn.

Kun la instruteknologia evoluo, tirante unu la alian antaŭen, evoluis kaj draste ŝanĝiĝis didaktikaj aliroj al la edukado: la roloj kaj interrilatoj de lernanto kaj instruanto ŝanĝiĝis, la interesoj kaj bezonoj de la lernanto estas en la fokuso, interkultura edukado fariĝis esence grava en la epoko de tutglobiĝo, eksterinstitucia kaj neformala kleriĝo forte evoluis, kaj la tutviva lernado fariĝis konsista parto de la ĉiutaga vivo.

Ĉio ĉi signifas *novajn vojojn de lernado,* kiujn priatentos la 49-a konferenco de ILEI tra diversaj formoj de la konferenca programo, inkluzive de la *Simpozio pri la konferenca temo*. Konforme al la Jaro de Lernanto, proklamita en la Strategia Laborplano de UEA, la E-lernantoj estos en la centro de atento. La tuta programo estos markita per tiu konferenctema orientiĝo.

## **Faka, kultura, distra kaj turisma programo**

La populareco kaj sukceso de la kurso por komencantoj kaj instrutrejna seminario dum la 48-a konferenco en Oostende signifas kuraĝigon al ILEI por plivastigo de la konferenca programpropono al E-lernantoj kaj instruantoj: kursoj por komencantoj, komencintoj kaj progresintaj gramatikemuloj, instrutrejna seminario kaj seminario pri E-kulturo kaj

interkulturo, ĉio en moderne ekipitaj prelegejoj de la Altlernejo de Nyíregyháza.

ILEI precipe alvokos lernantojn de duolingo.com kaj lernu.net por sperti la lingvon ĉeeste en Nyíregyháza. Kaj ILEI invitas siajn agantojn kiuj pretas venigi grupon al iu el la kursoj kaj seminarioj, aŭ mem prelegi, aŭ gvidi diskutrondon aŭ fakgrupon pri iu temo, sciigu tion al la estrarano pri konferencoj por interkonsenti kaj plani konkrete.

La tradiciaj *Interkona frandvespero*, *Nacia*, *Internacia* kaj *Adiaŭa vesperoj*, *Lingva festivalo* kaj *Konferenca bankedo* estas siaspecaj identigiloj de la konferencoj de ILEI. La diligenta kaj entuziasma LKK en Nyíregyháza planas aldoni *Konferencan balon* al la vespera programo. Por la junaj konferencanoj kaj ĉiuj kiuj sentas sin junaj, ni planas noktan amikan kaj muzikan programon kaj sportajn posttagmezojn.

Kaj ĉio ĉi, inkluzive de loĝado kaj manĝado, okazos praktike „sub la sama tegmento", en la komplekso de koridore kunligitaj konstruaĵoj de la Altlernejo, kun multe da spaco por eksterprograma amikumado ene, aŭ ekstere en belega ĉirkaŭa parko, aŭ en proksimaj tipe hungaraj restoracioj.

La turisma programo per duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj konigos al la konferencanoj la urbon mem, la proksimajn sallagan bankuracejon, bestĝardenon kaj etno-vilaĝon, kaj iom malpli proksimajn regionojn de Tokaj kun la famaj vinkeloj kaj regionon kie situas la Muzeo de Kolomano Kalocsay.

## Programkontribuoj

Viajn kontribuproponojn por la konferenca programo (prelego, kurso, diskutrondo, ateliero, muzika/danca programero, prezento de nacia lingvo, frandaĵoj por la interkona frandvespero k.s. bonvolu priskribi en aparta dokumento kaj sendu ĝin al estrarano pri konferencoj. Prelegproponoj enhavu prelegtitolon, kelklinian resumon, 3-5 ŝlosilvortojn kaj kelkfrazan prezenton de la aŭtoro(j). Viaj prelegproponoj kaj priskriboj de aliaj kontribuproponoj estos publikigitaj en la *Konferenca libro*.

## Simpozio

Fine de la konferenca semajno, 4/5 Aŭgusto 2016, enkadre de la konferenca programo, okazos ILEI-simpozio pri la konferenca temo: *Novaj vojoj de lernado*. Se vi deziras prelegi en la simpozio, bonvolu aliĝi per la konferenca aliĝilo kaj sendi vian prelegproponon al estrarano pri konferencoj.

Ĉiuj konferencanoj rajtas partopreni aŭ ĉeesti la simpozion sen aparta simpozia kotizo. Por tiuj kiuj deziras partopreni nur en la simpozio validas la nur-simpozia kotizo el la kotiztabelo ĉi-supre.

# Pliaj informoj

Vi povas legi pli pri la konferenco en la konferenca paĝo de ilei.info kaj en la konferenca retejo de LKK.

Ĉi tiu evento estas listigita ĉe la reta kalendaro de E-eventoj.